novaj sekretaj lingvoj en la kadro de kurso de Prof. Ronga, mi tute ne imagis, ke estas rilato inter Ronga kaj la junulo, kiu tiel ofte venis al mia hejmo insisti, por ke mi traduku la paperon pri l' trezoro."

* * *

"Jes," diris Tom. "Pro via plurfoja rifuzo, ili elpensis tiun planon. Kapti vin kaj perforte devigi vin traduki la tekston."

"Tiom da riskoj kaj zorgoj por nenio!" komentis Gerda. "Kia malsaĝeco! Kia stulteco!"

"Jes. Amatoroj," diris la policano malestime. "Ili agis amatore ekde la komenco. Pro tio ni tiel facile ilin kaptis. Sed pri tiu amatoreco vi danku Dion, Gerda. Pro tiu amatoreco ni povis liberigi vin, kaj vi plu vivas. Neamatoroj en simila situacio ne hezitus: vin uzinte, ili vin mortigus."

"Ĉu vere?"

"Jes. Vi sciis tro multe. Estus tro danĝere lasi vin vivi. Sincere, vi povas danki Dion, ke nur amatoroj planis kaj realigis tiun aferon."

Gerda silentis, pensema.

"Terure!" ŝi fine diris. "Ĉia-okaze, mi plej sincere dankas vin. Ĉiun el vi. Vi agis mirinde. Vi savis min kaj mian filinon. Sed, Bob, kion vi opinias pri la tuta afero? Vi ankoraŭ diris nenion."

Bob rigardis ŝin, kun iom stranga esprimo.

"Mi plezure trinkus glason da brando," li diris. Kaj li restis malĝojeta, dum ĉiuj aliaj ekridis.



# Ĉapitro 1

## EN UNIVERSITATA RESTORACIO

**Tom** Saluton, Linda.
**Linda** Saluton, Tom.
**Tom** Diru al mi: kiu estas tiu?
**Linda** Kiu?
**Tom** Tiu alta, blonda, juna viro...
**Linda** Kiu?
**Tom** Tiu, kiu sidas en la angulo.
**Linda** Ho, tiu!
**Tom** Jes, tiu.

* * *

**Linda** Mi ne scias. Mi ne scias, kiu li estas. Nova studento, ver-ŝajne.
**Tom** Li estas tute sola.
**Linda** Ne. Rigardu: bela knabino iras al li.
**Tom** Ne bela. Juna, *eble*, sed ne bela. Nur vi estas bela, Linda.
**Linda** Tom, kara! Kio okazas al vi? Eble vi laboras tro multe, kaj ...
**Tom** Nenio speciala okazas al mi. Kaj mi ne laboras tro multe. Fakte mi laboras malmulte nun. La vera demando estas: kio okazas al *vi*, Linda? Nur vi estas *vere* bela.